Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro MAJO/JUNIO 1950 n-ro 5-6

B o n v e n o n e n V i e n o !

Kiam vin, karaj gesamideanoj, atingas tiu ĉi numero de nia Revuo, nur plu kelkaj tagoj disigas nin de nia 4a Aŭstria Esperanto Kongreso. Trifoje la vienaj esperantistoj estisgastoj de niaj gesamideanoj en Kufstein, Linz kaj Graz. Nun ili deziras gastigi grandan nombron de esperantistoj en la muroj de sia gepatra urbo Vieno, la metropolo de Aŭstrio.

La L.K.K. ĉion plej zorge preparis por agrabligi la restadon de la ekstervienaj gesamideanoj, pri kio vi povas orientiĝi per la studado de la kongresprogramo. La estraro de A.E.F. siavice zorgis, ke la delegitoj de niaj landaj kaj lokaj organizacioj trovos sufiĉan tempon, por povi serioze kaj detale trakti ciujn organizajn kaj propagandajn problemojn de nia movado.

Ĉiu unuigo, ĉiu grupo, kiu gis nun ankoraŭ ne komisis delegiton al la kongreso, tuj do faru la elekton. Ĉiu gesamideano, ĉiu samideanino, ĉiu amiko de Esperanto, kiu gis nun hezitis, do ne pli longe prokrastu sian aligon al la 4a Aŭstria Esperanto Kongreso.

La vienaj esperantistoj preparis ĉn por bone akcepti vin kaj alvokas vin per: B o n v e n o n e n V i e n o!

* * *

KOMUNIKOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

Gravaj indikoj pri la
KVARA AUSTRIA ESPERANTO-KONGRESO EN VIENO 1950

Dato: 27a - 30a de Majo 1950.
Kongresejo: Varga's Dreherpark, Vieno XII., Schönbrunner-strasze 307. Tie: Kongresaj poŝtejo kaj restoracio.
Tramoj: 58, 63 kaj urba fervojo, haltejo Schönbrunn.
Kongresa akcepto: Sabaton, la 27an de Majo, ekde la 10-a antaŭtagmeze.
Pragramo: definitiva kaj detala: en la kongresejo.

G a s t b i l e t o j estas riceveblaj por la INTERKONIGA VESPERO (27.5., S 2.--) kaj por la VIENA VESPERO - (dancado), okazonta la 28an de Majo (S 3.--).

\- - -

A T E N T U !

P o s t k o n g r e s o de la 2a Internacia Fervojista E - Federacio, okazinta en Salzburg,
en Vieno kaj Weiden am See (Burgenland).
Partoprenos pli ol 100 eksterlandaj ges-anoj, inter ili ankaŭ la orkestro de la danaj fervojistoj de Aarhus.

Programo: Lunde, 22.5., INTERFRATIGA VESPERO en la salonego de la sindikata grupo Wien Nord, Vieno II., Nordbahnstrasze 50 - 52.

Marde, 23.5.: EKSKURSO al WEIDEN am See. Ekveturo de la E-Centro, I., Neutorg. 9 je la 13'00 h. Senpaga vinĝustumado kaj promenado tra la vinbergardenoj de Weiden a.S., aranĝota de la vilaĝestraro kaj vinkultura asocio de W.a.S. Muzikprezentado de la dana kaj loka orkestroj. Dancado ĝis mateno.

V i e n a j g e s - a n o j , a t e n t u !
Bonvolu gastigi la eksterlandajn geesperantistojn dum la restado en Vieno inter la 22a-24a de Majo en via hejmo ! A n o n c u t u j vian adreson al s-anino LOIBEL, E - Centro (U 23-1-80). Samloke vi ricevos ĉiujn informojn pri enlogigo.

* * *

Aktualaj bezonoj de la movado

Al nia kara kaj tre ŝatata s-anino Loibel, kasistino de AEF, sed fakte kunplenumantino de multaj centraj funkcioj, estas tre kara la sorto de nia movado en Aŭstrio. Tial kaj ĉar ŝi, la kara, sindonema "Esperanto-onklino" de la Centro, estas informita pri ĉio, kio koncernas la movadon, la redakcio petis ŝin, ke ŝi komuniku al ni siajn zorgojn, por ke el kompetenta buŝo ni eksciu la aktualajn bezonojn de gi kaj preparu nin por dum la kongreso komune trovi la vojon al la efektivigo.

Estas kutime, ke fine de la laborjaro oni memorigas pri la sukcesoj aŭ malsukcesoj de la pasinta jaro. Ankaŭ por ni esperantistoj estas necese, montri al la anoj kaj amikoj de nia ideo la agojn kaj erarojn. En la "Centro" de nia movado ĉio kolektigas kaj pro tio la ejoj tie devus esti la plej vigla loko en "Esperantujo". Sed kelkfoje la Centro pensigas pri ermitejo ... tro malofte vernas la esperantistoj.

Ŝajnas al mi, ke ni nepre devos venki la letargion kaj inertecon kaj ni devos komenci plivigligi la komunan vivon inter la esperantistoj mem, se ni ne volas, ke la esperantista movado farigu nura sekto.

La administra laboro en nia Centro estas sufiĉe amplekса; la korespondado, la interrilatoj kun la eksterlando, la sciigoj al la grupoj kaj membroj, la kontaktado kun la diversaj oficejoj de niaj lando kaj urboj, la kompilado de nia Revuo kaj ties ekspedo, niaj radio-disaŭdigoj, la pretigo de artikoloj, destinitaj por la gazetaro ktp ĉiam donas multan laboron. Sed la plej malfacila tasko estas por ni la gusta aplikado de la malmulta mono, kiun ricevas la Centro de AEF per la kotizoj. Turmentas nin la dilema demando: Ĉu ni sukcesos transiri tiun teruran, al kultura laboro malamikan tempon?

Nuntempe, malgraŭ ke en Aŭstrio vivas miloj da Esperantistoj, nur okcent de ili estas organizitaj en AEF kaj regule pagas siajn kotizojn.

Do, jen ni montras la plej urĝan laboron por niaj grupoj kaj membroj: NI DEVAS PLIALTIGI LA NOMBRON DE LA

PAGANTAJ MEMBROJ! Ni scias, ke n e a l t i g o d e l a k o t i z o , s e d n u r p l i a l t i g o d e l a m e m b r o n o m b r o dum̆ire povas ebligi la sukcesigan laboron de la Centro.

Due necesas, ke la nunaj kunlaborantoj serioze pripensu, ke LA KUNLABORO NEPRE DEVAS ESTI THE VIGLA! Ripro=ĉoj, ke io ne estas ĝuste farita (okazis ĉio, kio estis farebla), ne solvas la problemojn. La riproĉintoj mem montru, kiamaniere la aferoj estu solvataj. Nur dirante, ke "ONI" faru tion aŭ tion ĉi, oni ne helpas la aferon - MEM oni devas fari ĝin aŭ montri, kiu ebligas la plenu = mon de la proponoj! "Oni", tiu estas kutime "neniu"!

Idealo bezonas idealistojn kaj nia movado nur prosperos kiam, kiel iam antaŭ la milito, nia Centrejo estos plena je kunlaborantoj, kiuj laboras tie kaj ankaŭ kunhelpas plibeligi la ejon, por ke ĝi iĝu vera hejmo de la esperantistoj.

Trie estas urĝe necese, ke LA LANDESTROJ, GRUPESTROJ, SED ANKAŬ ĈIU UNUOPA MEMBRO ĈIAM PLENUMU LA SUGESTOJN, ESPRIMITAJN EN LA CIRKULEROJ de la estraro. Ekzemple por la radio-disaŭdigoj ni vokis al kunlaboro pere de priskriboj aŭ artikoloj pri la diversaj liglandoj, regionoj kaj urboj. La radioelsendoj estas nia plej grava propagandilo nuntempe. Ĉu vi jam plenumis vian devon, skribante al la radiostacioj Vieno, Graz, Parizo, Praha ktp.? Per tio vi helpas al la movado kaj asme al la laboro de la Centro.

Fine ni ankoraŭ volas peti, SUBTENU LA ELDONON DE LIBROJ, VORTAROJ ktp per aĉeto de la eldonaĵoj. Ne sufiĉas, ke kelkaj fervoruloj ĉiam oferas tempon kaj monon, dum la aliaj flanke staras kaj atendas "ĝis venos la tempo" por nia universala lingvo.

<u>Nur komuna laboro povas venki la malfacilaĵojn</u>. Ni havas belan Esperanto-centrejon, laŭ la diroj de eksterlandaj vizitantoj la plej belan en la mondo. <u>Zorgu per via kunlaboro, ke ne endangerigu la sukcesoj de la gisnuna agado.</u>

Ni dankas al ĉiuj, kiuj kunlaboris kaj ebligis la ĝoman prosperon, sed ni petas la gesamideanojn aliajn, bonvolu kunlabori en la venanta laborjaro, por atingi novajn sukcesojn.

Marie Loibel.

REPACIGO DE LA MONDO

Pri la aktuala temo "Repacigo de la mondo" parolis en la Viena popola altlernejo Alsergrund en Oktobro 1949 la Burgteatra aktoro Heinz M o o g, kiu en tri prelegoj prezentis trilogion "Genio kaj Intelekto savas la mondon", verkitan de d-ro Paul K l e m p e r e r , New-York.

La unua parto "KREDA UNUECO" temas pri la problemo, krei superkonfesian kredon, kiu, prenante la preskaŭ samajn etikajn elementojn de la ekzistantaj grandaj religioj, anstataŭos ilin per komuna, unueca kredo, ebliganta unuigon de ĉiuj kredemaj homoj. (La saman ideon jam pritraktis d-ro Zamenhof en sia broŝuro pri la homaranismo -1906.) La aŭtoro montras en formo de teatra ludo sinodon de ĉefpastroj el ĉiuj grandaj religioj, en kiu Genio kaj Intelekto sukcese decidigas la pastrojn, rezolucii tiun unuecan kredon por la tuthomaro.

En la dua parto "MONDMOZAIKO EL ATOMOJ" la aŭtoro priskribas en pluraj scenoj 'la kunvenon de "areopago", konsistanta el la grandaj spiritoj, filozofoj, scienculoj kaj ŝtatestroj, en kiu Genio kaj Intelekto fervorege klopodas estigi unuecan strukturon por mondkonstitucioj kaj mondregado. Komence oni citas la ideojn de la grandaj ŝtatfilozofoj de la lastaj 2500 jaroj por utiligi ilin ĉe la novkonstruo. Temas pri kreo de mondorganismo, konsistanta el samrajtaj atomoj, nomitaj "ĉeloj". Tiucele la grandaj ŝtatoj kaj teritorioj estas dispartigotaj je ĉeloj po proksimume 40.000 homoj. La ĉeloj de la antaŭaj ŝtatoj estas kunigotaj en "superaj regionoj", la superaj regionoj de la sama kontinento formas "kontinentan union" kaj la kvin kontinentaj unioj la "mondŝtaton". La regado estas en la manoj de la "mondkonsilantaro", konsistanta el la kvin "kontinent-konsilantaroj". La registara potenco estas dividita je legdonado, administrado kaj plenumanta estraro. Sekvas la regularoj pri ilia funkciado. La leĝaro baziĝas sur la demokrata ideo kaj garantias samajn rajtojn por ĉiuj pri plenaj evoluoj korpa kaj spirita.

En la regularo pri la mondregado estas unualoke proponata Esperanto kiel oficiala mondlingvo. La proponanto nomas ĝin vere genia, artefarita unueca lingvo, disvastigita jam en multaj landoj kaj praktike provita en mul-

taj mondkongresoj. Li mencias la evoluon de la Esperanta literaturo kaj la fakton, ke la Ligo de la Nacioj jam en la jaro 1922 rekomendis la enkondukon de Esperanto en la instrufakaron de la lernejoj. Ankaŭ la internaciaj komercaj ĉambroj subtenis la enkondukon de Esperanto. La propono tekstas: Esperanto estu tuj instruata en lernejo kaj familio krom la gepatra lingvo kaj post unu jaro ĝi estu la sola oficiale ĉe la registaraj oficejoj allasata lingvo. La leĝoj kaj la klasikaj verkoj de la ĝisnunaj lingvoj estas tradukotaj en la mondlingvon. La mondkonsilantaro eldonos liston de la tradukotaj klasikaj verkoj. Sed ĉiu rajtas ankaŭ estonte en la privataj rilatoj uzi sian gepatran lingvon kaj instrui gin al siaj infanoj.

En la debato pri la lingva problemo estis ankaŭ menciate, ke la filozofo Descartes jam enla jaro 1629 asertis, ke mondlingvo povos esti nur lingvo artefarita.

La lasta kunsido de la areopago solene aprobas la regularon.

La tria parto de la trilogio "FINO DE LA KLASBATALO" baziĝas sur la principo, ke la bonfartoj materia kaj sociala de ĉiuj homoj estas atingeblaj per pli justa distribuo de la riĉajoj de la tero. Ĉiu homo havu la samajn ekonomiajn sancojn, sed estas seme devigata, dediĉi sian tutan forton al la produktado. La rezulto de la produktado, la profito, estas dividota laŭ logika kaj justa sistemo inter ĉiuj, kiuj per sia kunlaboro ebligis tiun rezulton.

En la kunsidoj de la denove kunvokita areopago estas priparolata la problemo, ĉu la sistemo kolektiva, t.e. posedo komuna je produktiloj kaj laborefiko, estas akordigebla kun la sistemo individua, t.e. proprajo privata, ankaŭ je produktiloj kaj laborefiko. Sekvas reguloj pri la dispartigo de la neta profito, malsamaj por entreprenoj kolektivaj kaj entreprenoj individuaj, pri la daŭro de la laborado (ne malpli ol 30 kaj ne pli ol 40 horojn posemajne), pri sociala prizorgado, antaŭzorgado por la bezonoj nutraj kaj logejaj, asekuro pri akcidentoj, malsano, senlaboreco kaj maljunago. Speciale interesaj estas la decidoj pri limigo de privata havajo, de terposedajo, de salajraj enspezoj kaj de kapitaloj ĉe entreprenoj kaj bankoj.

Post longa debato la areopago akceptas la proponojn kaj la Genio instigas per entuziasmigaj vortoj la parto= prenintojn, propagandi en iliaj landoj la efektivigon de la ideoj pri mondstato kun unueca kredo kaj sen klasba= talo. Solene gi fermas la areopagon.

- - La aŭtoro prezentis sian broŝuron al multaj eminent tuloj el scienca, politika, eklezia kaj gazetara sferoj kaj ricevis de multaj flankoj aprobon. Tamen li konstatas, ke mankas aktiva kunlaboro kaj recenzoj en la gazetaro. Kon= sidere al la nuna politika situacio ja fakte tiaj radik= alaj reformoj nun apenaŭ havas sancon pri baldaŭa real = igo. G-i.

ROMAIN ROLLAND PRI LA HOMARANECO

"... Vi diras, ke mi jen tiujn popolojn amu kaj jen tiujn ci malamu. Mi amas aŭ malamas homojn. Kaj ekzistas en ciuj nacioj homoj noblaj, malnoblaj kaj meznivelaj, sed en ciuj nacioj la noblaj kaj malnoblaj estas raraj, la meznivelaj, kontraste, estas la granda amaso. Mi amas aŭ malamas homon pro tio, kio li estas kaj ne pro tio, kio estas la aliaj. Ec se ekzistus en ciu nacio nur unu homo, kiun mi amas, tio al mi sufic̆us por ne kondamni la nacion kiel tuton. Vi parolas al mi pri bataloj kaj en= naskita malamo inter la rasoj. La rasoj estas la koloroj en la prismo de la vivo. Per la brilanta kunludado inter ili ekestas la lumo. Ve al tiu, kiu rompas tiun prismon! Mi ne apartenas al iu raso, mi apartenas al la vivo. Mi havas fratojn en ciuj nacioj, egale, se ili estas amikoj aŭ malamikoj, kaj la al mi plej proksimaj ne estas ciam tiuj, kiujn vi al mi volas trudi. La animaj familioj es= tas disvastigitaj sur la tuta mondo."

N I A M O V A D O E N A Ŭ S T R I O

SUPRA AŬSTRIO: AEF-landestro Karl NIGL komunikas pri la turisma arango, kiun organizas la Linz-a grupo "ESTONTO", ke la vojagkaravano al Danlando estas kompleta. Anoncis sin 46 personoj, inter ili 16 geinst= ruistoj, kiuj diligente lernas E. kaj ec prezentos en Ger= manio 4foje, en Danlando 3foje kaj en Aŭstrio 2foje Aŭs=

trian Vesperon. La gekamaradoj en Holzminden, kie la vo=
jaĝontoj al Danlando intencas noktresti, invitis s-anon
Nigl, prezenti Aŭstrian Vesperon kaj transprenis la tutan
arangon en la Stadthalle (1200 pers.). Nunjare venos dana
karavano (30 pers.) al Aŭstrio. La ges-anoj alvenos en
Innsbruck la 10.7.50, restos tie 3 tagojn, en Salzburg 4
kaj en Linz 2 tagojn. La tiaj ges-anoj laŭ la raporto de
s-ano Nigl preparis belegan programon.

STIRIO: Rundschreiben 2/50 enhavis inviton por la 3a Sti=
ria Esperanto-Tago, fiksita je la 15.4.50 en Graz
Por la 24a de Aprilo estis fiksita la komenco de la unu=
aj ŝtataj E-ekzamenoj en Stirio. La E-lektoratoj en la
universitato kaj la teknika altlernejo de Graz jam estas
instalitaj. Lektoro estas s-ano prof. d-ro HAINSCHEGG. La
nombro de la lernantoj estas 30 en la universitato kaj
15 en la teknika altlernejo. Por la kontinua monata sub=
teno de senlaboraj s-anoj en Stirio (iniciatajo de s-an=
ino HALBEDEL), pri kiu ni skribis en la lasta Revuo, pret=
igis sin al kontribuo de 5 ŝil. jenaj ges-anoj: Dr. Halb=
edel, s-inoj Konrad kaj Marco, prof. Ignaz Storm, d-ro
Friedl, Schrotter, prof. d-ro Hainschegg. Por tiu fonduso
povas esti pagataj ankaŭ malpli ol 5ŝil. - La E-landest=
raro delegis prof. d-ron FLICK al la Landesjugendreferat
por prezenti en ĝi la interesojn de la E-movado. - - Dum
ĉeesto de E-landestrarano s-ano PODREPSCHEK okazis en
KAPFENBERG la fonda kunveno de la E-grupo "VERDA STELO".
Kiel ĉeffunkciuloj estis elektataj s-ano FASCHING (es=
tro), s-anino GERHARDT (kasistino) kaj s-ano SLIVKA, Kap
fenberg, Brandlg. 5 (afergvidanto). Ni kore gratulas al la
nova grupo kaj deziras al ĝi prosperan agadon por nia
afero! (Red.) - BICIKLA VOJAĜO TRA NORDA ITALIO. Inter la
22.7.-14.8. grupo da esperantistoj de la E-grupo "UNUECO"
en Graz biciklos jenan vojon al Italio kaj returne: Graz-
Villach-Tarvis-Udine-Venezio-Padua-Verona-Garda=lago-Mi=
lano-Novara-Torino-Genua-Milano-Como-Sondrio-Bozen-Cor =
tina d'Ampezzo-Lienz-Spittal-Tamsweg-Knittelfeld-Bruck -
Graz. La koresponda interligo kun la italaj Esperantistoj
en la urboj de la vojaĝvojo jam funkcias. Oni ĉie vizitos
la E-klubojn kaj prezentos por ili aŭstriajn popolkan=
tojn kaj kostumdancojn. En Torino oni intencas partopre=

ni la SAT-kongreson. Gvidanto estas s-ano A. PODREPSCHEK, Graz, Sackstr.16/1. El la agadraporto de E-societo "UNU=ECO", Graz, kiu atestas pri vigla aktiveco de niaj tieaj ges-anoj, ni citas ankorau jenajn lasttempajn arangojn: 19.2. - karnavala amuzajo "Balo de la Nacioj", bonege preparita de ges-anoj ing. PETER kaj MOSTL, kiun ceestis kelkcent personoj. - 20.3. - cefkunveno: La elektoj rezultigis jenajn ceffunkciulojn: ges-anoj PODREPSCHEK, prez., prof. d-ro FLICK, vicprez., AICHER, sekr., MESARITSCH, vicsekr., EDER, kas., SCHOLLER kaj SCHUTZENAU, kontr. La grupo gvidas kurson (PODREPSCHEK) kaj lerte arangas filmprezentadojn (s-ano RATH).

SALZBURG: La Salzburg-aj ges-anoj nun estas plene okupataj pri la preparoj por la 2a I.F.E.F.-kongreso. La kongresprogramo estas multpromesa! Merkrede, 17.5. akcepto de la kongresanoj, Interkonatiga Vespero; jaude 18.5., rigardado de la urbo, vizito de la akvo-artajoj en Hellbrunn, vespere solena malfermo de la kongreso, koncerto; vendrede, 19.5., laborkunsidoj, vespere "Fervojistoj koncertas por fervojistoj" (Dana kaj Salzburg-a orkestroj); sabate, 20.5., laborkunsido, hejmlanda vespero kun posta danco; dimance, 21.5., tuttaga ekskurso sub la devizo "Veturo en la verdejon". Lau la informo de s-ano Huber, O.K.K.-ano, la plej grandan parton de la eksterlandaj aligintoj formas 60 gekolegoj el Francio.

TIROLO: En la lastnumera raporto pri la agado de niaj tirolaj ges-anoj okazis, je nia granda bedauro, kelkaj gravaj eraroj, pri kiuj ni petas bonvolan pardonon: La E-baleto, kies bonega sukceso estas dankenda al la tradicie sukcesa regisorado de s-ano klubestro VISNEIDER, fakte okazis en KUFSTEIN (ne en Innsbruck). Krome s-ano FUTINGER (Salzburg) gvidos la diskutojn dum la Somera Universitato, okazonta en la kadro de la INTERNACIAJ FERIO-SEMAJNOJ, kiuj - ni gustigas - estas gvidataj de la E-landestro de Tirolo, s-ano Hans STEINER (Red.)-E-klubo "PIONIRO", Kufstein, la 26.3.50 arangis sian General-kunvenon. La novelektoj rezultigis jenan estraron, kies ceffunkciulojn ni prezentas: ges-anoj VISNEIDER, FANKHAUSER (estro, vicestrino), VOIGT, FUHRER (sekreta=

riinoj), SCHEIFLINGER, FÜHRER (kasistoj); kontrolo:KAUFMANN, ZECH.El la agadraporto pri la pasinta laborjaro evidentiĝas grandaj vigleco kaj lerteco de la klubo. Bedaŭrinde la nuna formato de nia Revuo ne permesas al ni la registradon de giaj atendindaj Esperantistaj travivaĵoj.

MALSUPRA AŬSTRIO: La gesanoj de la E-SOCIETO WR.NEUSTADT okazigis la 5an de Marto sian jaran ĉefkunvenon. En la ĉeesto de E-landestro, k-do SCHWARZ, kaj la grupestro de Felixdorf, k-do PATEK, k-do SCHMID, gvidanto de la societo, raportis pri la pena laboro dum la pasinta periodo.Kvankam sukcesoj propagandaj ne estas noteblaj, tamen oni kontente povas konstati pliperfektiĝon de la lingvoscio de la membroj, kiuj restis samnombraj. Kiel estraron oni elektis ges-anojn SCHMID,HANDLER Franz (estro, vicestro), HANDLER Heinz, SCHÜGERL (sekretarioj), HALLING, RUBEL (gekasistoj), MACHEINER (biblioteko) kaj THÖNEL, BAUMRUCK (kontrolistoj).La kunvenint = aro decidis,ke la societo plu restos membro de AEF.Fermante la kunsidon, k-do SCHMID stimulis la anaron por multnombra partopreno al la nunjara Aŭstria E-Kongreso.

VIENO: ŜTATAJ ESPERANTO-EKZAMENOJ! Laŭ sciigo de la Ŝta= ta Ekzamenkomisiono por Esperanto komenciĝas la ekzamenoj pri la instruofiĉo kaj por la atesto pri la scio de E. la 31an de Majo ĉj. je la 8-a matene per la ekzameno skriba en la domo de Bundeslehrerbildungsanstalt en Vieno I., Hegelgasse 12 kaj estas daŭrigataj je la sekvontaj tagoj. La tempo de la praktika kaj busa ekzamenoj estos al la kandidatoj persone komunikata. La petskriboj por la akcepto ĉe la ekzameno, laŭ § 4 de la ekzamena instrukcio provizitaj per atestiloj kaj unu Bundesstempel po sil.4.-- (almetajoj,escepte de la literatura listo, sil.1.-- Bundesstempel), estas transdonendaj ĝis lastdate la 15a de Majo en la Direktion der Prüfungskommission, Wien I., Minoritenplatz 5 (Bundesministerium für Unterricht).La ekzamenkotizo estu pagata antaŭ la komenco de la skriba ekzameno en la ekzamenejo. Listo de la verkoj,rekomenditaj por la preparo al la ekzameno, estas ricevebla kun la ekzamena instrukcio kaj ekzakta indiko de la porekzamenaj sciendaĵoj en Oesterr. Bundesverlag, Vieno I., Schwarzenbergstr. 5.

HONORVESPERO POR DIREKTORO RUDOLF KAFTAN estis solene arangata de AEF, Viena E-Delegitaro kaj la E-societo "Danubio" la 15an de Aprilo. Ni Vienaj ges - anoj festis la 80an jaron de nia kara,multestimata pioniro profesoro Kaftan, kiu samtempe havis sian 40jaran jubileon kiel esperantisto. S-ano Kaftan, kiu mem ekkonis la Majstron dum la jubilea E-kongreso en Krakovo kaj senĉesterrompe sindone aktivadas por la Zamenhofa afero, felice estas fizike kaj spirite tre bonfarta kaj energie administras, kiel ni scias, la faman Vienan horlogmuzeon, kiun li mem fondis. Al la koraj gratuloj kaj bondeziroj, esprimitaj al li nome de la diversaj E - unuigoj de la samideanoj d-ro GRIMME (AEF), VOKAL (VED), MUDRAK (AKLE), SIEGHARTNER (por la Linz-aj ges-anoj), ZINK (fervojista fakgr.), BERDAN, CECH (Danubio) kaj H.KRAUS (Kalocsay-Laboro) ankaŭ aligas la redakcio de AER, dankante al li samtempe pro liaj agemo kaj fideleco por Esperanto. Proksimume 80 Vienaj geesperantistoj kaj pluraj gastoj el Linz ĉeestis la solenon. Al s-ano Kaftan estis donataj belaj floroj k honordiplomo,altarte desegnita de s-anino ZIWUTSCHKA.

La dua parto de la festeto estis dedicata al la 33a datreveno de la elmondiĝo de nia kara Majstro. La festparoladon pri "la homo Zamenhof" faris en konata sagaca maniero s-ano Ernst WERNER, sekretario de la Aŭstria E-Instituto. Belatmosferigis kaj arte altniveligis la tutan okazaĵon la muzik- kaj kantprogramoj, kontribuitaj de s-ino Anni WEINHENGST, s-roj SCHÖNWEITZ kaj GONAUS kaj de nia s-ano Rikardo LORENCO. Esperantajn poemojn citis s-ano Emil VOKAL.

La kluboj KALOCSAY-LABORO informas pri la nova estraro, elektita dum la generalkunveno la 30-an de Marto : Honorprez.: Koloman KALOCSAY, honormembroj s-anoj W.ULLRICH kaj ofickons. GASPERINI; prez. d-ro N.HOVORKA; afergv.prezidantoj: H.KRAUS kaj NOVAČEK; kaso:ges-anoj WRATNY kaj STÖCKL. La ges-anoj arangis en la pasinta agperiodo 52 kunvenojn. Dum ili la programo entenis interalie 6 lumbildparoladojn, 12 prelegojn, leter- kaj tradukvesperojn kaj 9 rendevuojn en Türkenschanzpark. Pro kontribuoj al la programo ili dankas speciale al la gastoj, la s - anoj HAIDERER, KATZIANKA, LACKNER, MUDRAK, VOKAL kaj ZODEL. Meznombra vizito de la klubvesperoj: 12 personoj.

Por progresintoj estas formita studrondo, gvidata de s-o H. Kraus. La biblioteko de "Laboro" enhavas pli ol 300 librojn kaj broŝurojn, kiuj estas ankaŭ je dispono por nemembroj. - "DANUBIO" - VII., Sigmundg.14, kunvenos dum la someraj monatoj ree ĉiun duan kaj kvaran lundon je la 18a. La societa biblioteko entenas 500 volumojn. Literaturemaj geaanoj al aliaj Vienaj AEF-grupoj rajtas ilin uzi, aliginte kiel akcelantaj membroj al la societo.

E L L A F A K G R U P O J

Laborista Esperantistaro

la de Majo 1950

Kiel ĉiujare la Vienaj laboristaj esperantistoj partoprenis la demonstraciojn de la laboristaj partioj kiel aparta formacio por tiamaniere efike propagandi Esperanton al la vasta laborista publiko. Du ruĝaj standardoj, ornamitaj per la verda stelo, kaj unu ruĝa transparento, portanta la devizon "Per Esperanto por Socialismo", atentigis pri la internacia lingvo kaj la aggelo de la Laborista Esperantistaro. Aklamado kaj esperantlingvaj salutoj el la spaliro evidentigis, ke nia ideo fakte estas populara en la popolo de Vieno. Sur la tribunoj de ambaŭ partiestraroj ni estis salutataj tra la megafono, kiu estis instalita sur la tuta marsejo de Ring kaj Stalinplaco. Sur la urbdoma placo la parolanto menciis, ke ... nun venas la laboristaj esperantistoj, kiuj ja ankaŭ la socialismon estas skribintaj sur sian standardon ... kaj desur la stuparforma tribunego la Socialista Junularo ĥore vokis al ni: "Ni salutas la laboristajn esperantistojn!", kaj ni niaflanke ĥore salutis nian esperantistan urbkonsiliston JONAS, kiu ankaŭ staris sur la honora podio.

Ĉe la parlamento el la Centra Komitato de la Kompartio ni aŭdis eĉ unu voĉon, kiu kriis al ni: "Liberecon, kamaradoj!". "Volksstimme" ankaŭ menciis nin en sia raporto pri la ranĝoj de la la de Majo.

La 30an de Aprilo la Laboristaj Esperantistoj estis farintaj ekskurson en la ĉirkaŭaĵon de Vieno.

Naturamikoj

La 7an de Marto okazis en la Naturamika Hejmo, Vieno XV., Diefenbachgasse, la bone vizitita plenkunveno de nia fakgrupo. K-do WISGRILL, reprezentanto de la landa grupo Vieno, salutis nin en la nomo de la Naturamika organizo kaj promesis la subtenon al Esperanto. La fakgrupo nun havas 62 membrojn kaj organizis elementan kurson, partoprenatan de 12 personoj. Per ski-gimnastika kurso, kiun frekventis 22 personoj, plejgrandparte ne-esperantistoj, la grupo havis malgrandan mongajnon. La grupo vigle interrilatas kun la naturamikoj de aliaj landoj. Dum la novelekto la plenkunveno unuanime reelektis k-don FINKENZELLER kiel prezidanton, kiu dankinde denove transprenis sur sin la ŝargon de tiu respondeca funkcio.

Dum la generalkunveno de la Naturamika landa grupo Vieno parolis k-do FINKENZELLER al la 120 delegitoj pri la valoro de E. por la internacia naturamika movado. Li diris, ke la internacio de la Naturamikoj nur estos perfekta kiam la naturamikoj el ĉiuj landoj komprenos sin reciproke per unu lingvo - per Esperanto. La delegitoj kun konsanta aplaŭdo akceptis lian paroladon.

Katolika Esperantista Vivo

AKLE, Vieno, leteradr. W.Mudrak, 3., Beatrixg.19/9, kunvenas 1., Graben 13/I/II/25, la 2an kaj 4an de la monato, je la 17a-19a. KURSO ELEMENTA marde 19a-20a samloke. Dua kurso merkrede 19'30a en 16., Hl.Geist-paroĥo.

XXIIa INTERNACIA KATOLIKA E-KONGRESO la 10an - 17an de Aŭg. en Romo. Adr.: P.prof. M. Carolfi OFM, 124 b Via Merulana, Roma. (Detaloj tie, resp. ĉe AKLE).

AKLE, Vieno, i.a. aranĝis DI-SERVON je 19.3. (Sta. beno kaj E-prediko de P.PLANK pri Sta.Josefo) kaj PASKOSOLENETON je 11.4.50. - "Kalasantiner Blätter", Soziale Monatsschrift (socia monata revuo de kongregacio de Kalasanc-anoj) en n-ro Aprilo 1950 enhavis detalan artikolon de s-ano MUDRAK pri "laboristaro kaj komuneca lingvo".

E. ĉe "Di-servo de la nacioj". En preĝejo S. Andrea della Valle en Romo la 12an de Januaro antaŭ impona ĉeestantaro oni pregis kaj kantis en 25 lingvoj, ankaŭ en

Esperanto. La aranĝo estis filmata kaj radie aŭdigata.En preskaŭ ĉiuj gazetraportoj oni legis speciale pri la apliko de E. - Laŭ oficiala eklezia permeso P. CAROLFI dum la tuta Sta. Jaro rajtas konfespreni en E. Lia konfesejo en la baziliko Sta. Johano en Laterano havas la surskribon: "Oni konfesprenas en Esperanto". KATOLIKOJ KAJ PROTESTANTOJ. Lia papa moŝto Pio XIIa mem en la lasta tempo esprimis sian aprobon pri kunlaboro de katolikoj kaj protestantoj sur kampoj sociala kaj karita. Laŭ tiu konsidero ni ankaŭ mencias raporton jen alvenintan pri protestanta KRISTANA KONFERENCO, okazonta de 29a de Julio ĝis 5a de Aŭg. en Rochette(Pariza regiono) aranĝita de "Kristana Esperantista Ligo Internacia".Detalojn ce:Dabezies avenue Debidour, 2, Paris (19e).

Fervojista fakgrupo

NEKROLOGO. La fakgrupo kaj la sekcio Linz perdis unu el la plej fervoraj membroj. S-ano Alois S a s s m a n n iris por ĉiam de ni. La enterigo okazis la 12an de Aprilo en Vieno. Al la edzino de la kara mortinto ni esprimas nian plej profundan kondolencon, al la mortinto mem ni promesas, ke ni daŭrigos lian idealan vojon.

Por la fakgrupo: Zink, sekr.

INTERNACIA ESPERANTO-MOVADO

Internacia E-Muzeo en Vieno I.,Hofburg, Batthyanystiege, vokas ĉiun esperantiston, subteni ĝin, sendante por ĝi ĉiujn eldonajojn kaj objektojn, rilatantajn al E. kaj al la mondlingva demando. Ĝi serĉas ĉie subtenantojn, kiuj per mono (respondkuponoj) helpas por la administrado kaj pligrandigo de la muzeo kaj kolektas materialon kaj varbas subtenantojn. - Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj (TAE) 1950 aperos baldaŭ. Pro kotizoj, anoncoj, pagmaniero ktp. informu vin ĉe s-ano Hofrat Hugo STEINER, adreso de la Internacia E-Muzeo. - Gepatroj sin defendas - lernante Esperanton. En lernejo de angla distrikto ek de la militfino estas instruata E. Multaj lernantoj jam regas la lingvon perfekte kaj ŝatas uzi ĝin precipe kiam ili deziras, ke la gepatroj ne komprenu ilin. La endile-

migintaj gepatroj nun ekuzis la solan rimedon por helpi sin: ili same lernas E. por tiel ekkoni la "Esperantistsjn sekretojn" de siaj infanoj. - La jarkunveno de la Norvega Esperantista Ligo akceptis rezolucion, en kiu gi konstatas, ke la proponoj de pastro KUBACKI, South Bend, Indiana, Usono, pri sangoj en la ortografio kaj vortaro de E. estas kontraŭaj al la Fundamento de E. kaj nur povas malutili al la ideo de la internacia lingvo. Gi rekomendas al la tutmonda esperantistaro, malaprobi kaj kontraŭbatali la agadon de pastro K. kaj admonas lin cesigi lian subfosan laboron en la intereso de la internacilingva movado. - Esperantista Informa Servo (EIS), Trencin, Cehoslovakio, komunikas favorecon de la cehoslovaka junularo por E kaj mencias subtenon je sumo de 15000 kcs al la E-grupo en Svit, ricevitan de la tiea Entreprena Sindikata Klubo. Unueca Nacia Komitato en Zilina donacis 5000 kcs al la Slovaka E-Instituto por "Esperantisto Slovaka". --- Internacia Junular-Kunveno de TJO 1950 okazos de la 28.7.-4.8.50 en Konstanz apud Bodensee/Germanio. La programo antaŭvidas germanan, nederlandan, britan, aŭstrian kaj francan festvesperojn. Tiam el la naciaj moroj estos donataj fragmentoj per teatrajoj, popoldancoj kaj popolkantoj. La ceftemo estos Esp. kaj la junularo. Oni projektas ekskursojn al Svisio kaj Aŭstrio. Pri detaloj informu vin ce la Loka Organiza Komitato, s - ano Michel SCHMIDT, (17b) Konstanz a.B., Grüngang 9. -- Informoj de la Germana E-Asocio sciigas, ke vojagoj en Germanion ekde nun estos pli facilaj, kaj la germanaj ges-anoj invitas la alinaciajn geesperantistojn al vizitado, pro mesanto en la nomo de la asocio koran, amikan akcepton. Vojagemuloj kaj karavanestroj skribu pro informoj al GEA (13b) München-Pasing, Engelbertstr.7. - Fondigis fakgrupo de sxofataj kaj urbaj oficistoj en SEAT (Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda), kiu celas diskonigi en siaj rondoj la ekzistokondicojn de la publikaj oficistoj. Interesitoj turnu sin al k-do ARPENT, Syndicat des Municipaux de Bordeaux, Gironde - Francio (kotizo inkluz. SEAT 200 fr, frankoj). - Internacia feria E-kurso okazos inter 13.8.-2.9. (post la UEA-Kongreso) en Saint-Germain en Laye Arangas gin GEE (Asocio de E-istaj Geinstruistoj): s-ino Jeanne DEDIEU, 3 Rue Arzac, 3, Toulouse, Francio. S-ino

AER 1950
JUNI

Dedieu ankaŭ turnis sin al ni per propono pri kontaktigo de junaj francaj kaj aŭstriaj E-istoj (malpli ol 30jaraj kaj bone sciantaj E.). La renkonto okazu en Tirolo! S-ano HIKKERSBERGER, bv. interrilati kun s-anino profesorino Dedieu, prez.de GEE! - Itala E-Federacio, propagandofico Via Saluzzo 44, Torino, grave ekpaŝis por interesi la Ĕŭropan Federalisman Movadon pri E. Ĝi varbis sialandajn parlamentanojn por nia ideo kaj unu eĉ prezentos propon non dum la Aŭgusta kunsido de Ĕŭropa Konsilantaro! La Itala E-Federacio alvokas por partopreno al tiu agado la landajn E-asociojn kaj grupojn kaj petas ilin efike prepari sukcesŏn de ilia gravega entrepreno. Oni proponu la akcepton de E. per la federalistoj de la respektiva lando kaj ĉial interrilatu kun la italaj s-anoj!

* * *

La radiosendilo Rot-Weisz-Rot vokis la aŭskultantaron por konigi al si la opiniojn kaj dezirojn pri la send programo. Gesamideanoj, uzu kun ni tiun fervoran okazon, por subteni Esperantoservon nian! Skribu vian peton pri Esperantosendoj (informoj, kurso, arta programo ktp.) al jenaj adresoj: Studio Wien der Sendegruppe Rot-Weisz-Rot, Wien 7., Seideng.13; Studio Linz der Sendegruppe RWR, Linz Obere Donaulände 1; Studio Salzburg d.Sendegr.RWR, Salzburg, Hofstallg.5!

Al Redaktion "Die Frau", Wien 5., Rechte Wienzeile 97, sendu aprobon kaj gratulon pro la aperigita E-kurso!

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.